

ILEI Symposium abstract, Frans Gregersen

Challenges and opportunities for language policies in Europe. Denmark as an example

The present era poses specific challenges for language policies in smaller countries simply because the market forces tend to favour the use of English as not only a lingua franca for science, technology and very often also leisure activities and cultural products, but in addition, and for the very same reasons, as the first taught foreign language. The aim seems to be to create bilingual communities where the local language functions as the first language used in families, while English universally is seen as the privileged second language used for a growing number of purposes. At the end of this development, the spectre of a situation with English only seems to lurk with its disastrous consequences of language attrition or loss.

In the lecture I will attempt to present first the market pressures and their logic, secondly what has been done by the Danish language politicians and the politicians in general with a focus on language use at universities; thirdly the Nordic alternative will be discussed with the Nordic Declaration on Language Policy as a case in point and finally I will sketch a possible future for Europe based on a regional model akin to the Nordic one and the principle of educating for listening comprehension.

Frans Gregersen

Defioj kaj perspektivoj por lingva politiko en Eŭropo, laŭ la ekzemplo de Danlando

Resumo

La nuntempa epoko prezentas specifajn defiojn por la kreo de lingvopolitiko en pli malgrandaj landoj nur pro tio ke la potenco de la merkatoj emas favorigi la uzadon de la angla ne nur kiel lingvafrankao por la scienco, teknologio kaj tre ofte ankaŭ por ekster-laborejaj plaĉokupoj kaj kulturaj produktoj, sed aldone, kaj samkiale, kiel la unuavice instruata fremda lingvo. Per tio oni ŝajne celas krei dulingvajn komunumojn kie la loka lingvo funkcias kiel la unua lingvo uzata en familiaj rondoj, dum oni konsideras la anglan universale kiel la privilegiitan duan lingvon uzatan por kreskanta celaro. Fine de tiu disvolviĝo, ŝajne hantas situacio en kiu kaŝatendas la angla lingvo, kovanta la katastrofajn sekvojn de neuzado aŭ tuta malapero de aliaj lingvoj.

Dum mia prelego mi provos prezenti unue la premojn de la merkato kaj la logikon de tiuj premoj, kaj due kion jam faris la danaj politikistoj kaj politikistoj ĝenerale enfokusigante lingvouzadon en la universitatoj; trie mi diskutos la Nordian alternativon citante la Nordian Deklaron pri Lingvopolitiko kiel specifan kazon, kaj fine mi skizos eblan estontecon por Eŭropo bazitan sur regiona modelo parenca al la Nordia, kaj la principon de la instruado de lingva aŭskultokompreno.